WIKIPEDIA

Sinhala lingvo

Teĥnika noto: Pro teĥnikaj limigoj iuj TTT-legiloj ne povas montri specialajn signojn, uzatajn en ĉi tiu artikolo. Tiaj signoj povas esti montritaj kiel kvadratetoj, demandosignoj aŭ aliaj sensencaj signoj depende de viaj TTT-legilo, operaciumo kaj instalitaj fontoj. Eĉ se via TTT-legilo kapablas interpreti UTF-8-n kaj vi instalis tiparon, kiu subtenas grandan diapazonon de Unikodo, vi eble bezonos uzi alian TTT-legilon, ĉar tiurilataj ebloj de TTT-legiloj ofte diferencas.

La **sinhala lingvo** estas parolata en Srilanko de pli ol 15 milionoj da parolantoj, apud la tamila[1] (ankaŭ oficiala lingvo) kaj la angla kiel 'interlingvo'[2]. Ĝiaj ISO-kodoj estas *si* kaj *sin*. La lingvo havas apartan alfabeton kaj la plej multaj lingvanoj etne estas sinhaloj. Ekzistas vikipedio en la sinhala lingvo.

La palia kaj la sanskrita lingvoj ankaŭ influis la disvolviĝon de la sinhala pro sia asocio kun budaismo. Tial la sinhala estas la lingva koro de la budaisma praktiko en Srilando[2]. La kontakto de la sinhala kun la portugala, nederlanda kaj angla sekvis la kolonigon de la lando fare de la portugaloj, nederlandanoj kaj britoj inter 1505 kaj 1948 (Rogers 1994, 2004).

sinhala	
සිංහල	
Parolata en	Srilanko
Parolantoj	16 000 000
Denaskaj parolantoj	>15 milionoj
Skribo	Sinhala alfabeto
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	si
ISO 639-2	sin
ISO 639-3	sin
SIL	SIN (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=sin)
Glottolog	sinh1246
Angla nomo	Sinhala
Franca nomo	cingalais
Vikipedio	

Enhavo

Pri la angla en Srilanko

Vidu ankaŭ

Eksteraj ligiloj

Notoj kaj referencoj

Pri la angla en Srilanko

Post kiam Srilanko gajnis sendependecon de la britoj en 1948 la angla restis la dominanta lingva influo sur la sinhala en nuntempa Srilanko[2]. La Oficejo de Oficialaj Lingvoj de Sri-Lanko estas la sola aŭtoritato kiu havas la povon efektivigi lingvopolitikojn en la lando.

Ĝis la jaro 1956 la angla estis la oficiala lingvo laŭ la srilanka konstitucio[1]. La socia, kultura, ekonomia kaj politika influoj de la angla lingvo sekve de ĝia konstitucia pozicio, severe subfosis la statuson de sinhala. Multaj srilankanoj vidis en la angla lingvo rimedon kaj al enpovigo kaj fremdigo (alienation), kvankam nuntempe la sinteno vidalvide de la angla iĝis pli pozitiva sub la influokresko de ĝia prestiĝo akiri pli altajn profesiajn postenojn[3].

Vidu ankaŭ

Mahla lingvo aŭ diveh/maldiva lingvo.

Eksteraj ligiloj

(angla) Tanya Nissani Ilangakkone Ekanayaka, *Sinhala, English and multilingualism in Sri Lanka: An overview* (sinhala, angla kaj plurlingveco en Srilanko), p. 17, En : Theorising the Practice of Language Mixing in Music: An Interdisciplinary (Linguistic and Musicological) Investigation of Sri Lanka's Leading Genre of Contemporary Popular Song and its Community (https://www.era.lib.ed.ac.uk/bitstream/handle/1842/5518/Ekanayaka2011.pdf?sequence=1&isAllowed=y) (PDF)

Notoj kaj referencoj

1. ↑ 1,0 1,1 Noto : la angla estis la oficiala lingvo de la lando inter 1796 kaj 1956. Kvankam oni donis al la angla 'oficialan' statuson en la nordo kaj oriento de la lando sub la akto 'specialaj provizoj' de 1958, oni devis atendi ĝis 1972 antaŭ la tamila ricevis konstitucian aprobon, kvankam ĝi estas la 'nacia' lingvo kaj ke nur en 1987 la tamila akiris egalan statuson kaj estis deklarita "oficiala" kaj "nacia" lingvo kune kun la sinhala.
2. ↑ 2,0 2,1 2,2 (angla) Tanya Nissani Ilangakkone Ekanayaka, *Sinhala, English and multilingualism in Sri Lanka: An overview* (sinhala, angla kaj plurlingveco en Srilanko), p. 17, En : Theorising the Practice of Language Mixing in Music: An Interdisciplinary (Linguistic and Musicological) Investigation of Sri Lanka's Leading Genre of Contemporary Popular Song and its Community (https://www.era.lib.ed.ac.uk/bitstream/handle/1842/5518/Ekanayaka2011.pdf?sequence=1&isAllowed=y) (PDF)
3. ↑ (angla) Tanya Nissani Ilangakkone Ekanayaka, , The development of English in Sri Lanka and Sri Lankan English/es; an overview, p. 19-25, En : Theorising the Practice of Language Mixing in Music: An Interdisciplinary (Linguistic and Musicological) Investigation of Sri Lanka's Leading Genre of Contemporary Popular Song and its Community (https://www.era.lib.ed.ac.uk/bitstream/handle/1842/5518/Ekanayaka2011.pdf?sequence=1&isAllowed=y) (PDF)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Sinhala_lingvo&oldid=6682988"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 19:30, 15 aŭg. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.